
Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

20-a Jarkolekto * Decembro 2003 * N-ro 72

ISSN 1576-0618



Jimena de la Frontera en Kadizo,
en la plej suda el la sudoj ekzistas paca renkontiĝejo

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Armengual de la Mota 33, 4-D, 29007 MÁLAGA.
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: La Reprografía, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ
REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 MÁLAGA, esperanto@ciudadfutura.com)
José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ (esperanto14@supercable.es)
COLABORADORES:W. Gunther, Luis SERRANO PÉREZ, José Antonio VALVERDE MARTÍN

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio. 3
La Metra Sistemo 6
Dialogoj kun mia Edzino 8
La Ekskurso de Azeno el Velez Rubio 11
Interlingvistiko: *Frendo*....13
Paĝoj pri nia Historio 17
Krucvortenigmo 21
Poezio 22
Alta Komisiito de NU por rifuĝintoj 23
Andaluza Literaturo: *Alia Pasia Krimo* 24
Andaluza Kuirarto....27
Flamenko....28
Turismi en ... *Jimena de la Frontera* 29
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio 31
Komercaj Petoj kaj Proponoj....32
Internacia Semajno ĉe Mediteraneo 33
Fina Paĝo 34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



SEVILO

- Grupo de sevilaj esperantistoj pripensas la ideon organizi kaj krei esperantistan asocion en Sevilo. Ili renkontiĝas ĉiusabate je la 10´30a horo en la Placo *Encarnación*. Se Vi loĝas en Sevilo kaj Vi deziras kunlabori kun tiu ideo ĉeestu tiujn renkontiĝojn, vizitu la paĝon *esperantoenseviljo* ĉe www.msn.es aŭ simple telefonu al la numero 661-404-120 (Manuel).

- La pasintan monaton septembron okazis en Sevilo la 1a Renkontiĝo de Specialistoj pri Blas Infante kaj la Historia Andaluzismo, organizita de la Centro de Historiaj Studoj pri Andaluzio ĉe la Lernejo de Hispanamerikaj Studoj en Sevilo kaj ĉe *Dar-Al-Farah* (Vilao Ĝojeco), la hejmo de Blas Infante, kaj nuntempa sidejo de lia fondaĵo. Partoprenis en la debatoj elstaraj specialistoj en la vivo de Blas Infante, la patro de la Andaluzia Patrujo, inter ili lia biografiisto Pastro Enrique Iniesta, kiu prezentis dum la renkontiĝo sian duan volumon de la biografio de Blas Infante, kie oni mencias la esperantistecon de tiu elstara andaluzia naciisto. Dum la renkontiĝo nia samideano Juan de Dios Montoto Sarriá prelegis pri la koincidoj inter Blas Infante kaj Esperanto. La prelego okazis la 20an de septembro ĉe *Dar-Al-Farah* en la sevila vilaĝo Coria del Río.

JAENO

- La organizantoj de la festivalo ETNOSUR aprobis la projekton prezentita de Jaena Esperanto-Asocio organizi kurseton de la internacia lingvo dum la okazigo de la venonta festivalo. ETNOSUR estas kultura internacia festivalo kiu okazas ĉiujare dum somera semajnfino en la jaena vilaĝo Alcalá la Real. Se vi vidas tiun vilaĝon

sur mapo vi povos vidi, ke ĝi strategie lokiĝas en la vilaĝo Jaeno, sed tuj apud la provincoj Kordovo kaj Granado. Dum la festivalo okazas granda nombro de kulturaj agadoj kiuj celas diskonigi la kulturon, arton, muzikon kaj gastronomion de multaj nacioj de la Tero. Espereble dum la venonta ETNOSUR okazos esperanto-kurseto.

MALAGO

- La pasintan 10an de februaro komenciĝis en Malago, ĉe la sidejo de la sindikato CGT (str. Madre de Dios 23), kurso de la internacia lingvo esperanto. La kurson organizas Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj ĝin oni povas sekvi ĉu per normalaj klasoj ĉu per Interreto. La klasoj okazas ĉiuj mardoj de la 6a ĝis la 7´30a vespere ĉe tiu adreso jam menciita. Oni povas ricevi pliajn informojn pri tiu kurso ankaŭ pere de la elektronika adreso aarquillos@lycos.es kaj per la telefono 625-68-89-24.

- Prizorgata de nia samideano David Rodríguez en Malago, oni redaktis la novan oficialan TTT-paghon de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ĉe http://www.andalucia-esperanto.tk La enhavo de la paĝo ankoraŭ ne estas definitiva, do ĝi estas tute malfermita al la kontribuaĵoj kaj al la teknika helpo de kiu ajn deziranta kunlabori en ĉi tiu projekto.

HUELVO

- Ni memorigas al niaj huelvaj gesamideanoj informon kiu jam aperis sur la pasinta numero de nia revuo kaj kiu ĉi-numere denove sciigas al ĉiuj eblaj interesitoj. Tiuj huelvaj gesamideanoj kiuj deziras babili per la reto kaj eĉ foje kunveni povas kontakti kun Victor Manuel Macías per la elektronika adreso vmmcaro@ono.com

KORDOVO

- La Kordova Esperanto-Asocio jam ekfunkciigis, kvankam nur provizore, sian novan TTT-paĝon. En ĝi oni povos legi ne nur informojn pri esperanto al tiuj eblaj interesitoj sed ankaŭ oni disponigos turismajn informojn al la esperantistaro pri ĉi tiu urbo, kies antikva kvartalo estas "Proprajo de la Homaro" deklarita de UNESKO. La situo ĉe interreto estas http://es.geocities.com/esperantocordoba.index.html






La revuo *XPLORA* (n-ro 11, aprilo 2004) aperigas 6-paĝan legindan artikolon pri esperanto. La aferon oni prezentas tre, tre bone kaj la fotoj estas allogaj. La kerno de la artikolo ŝajnas esti intervjuo kun Ana MANERO (de la Hispana Esperanto-Federacio). Oni aperigas ankaŭ mallongajn informojn por detrui la ĉiamajn dirajojn pri esperanto, ekz. utilas por nenio, neniu parolas ĝin, la angla estas pli bona internacia lingvo....

LA METRA SISTEMO

j.m.r.h.

Nia elstara kaj neforgesebla samideano Tomás Caspe ĉiam diris al la gelernantoj, okaze de la kursoj de la internacia lingvo organizitaj antaŭ kelkaj jaroj en Sevilo, ke la sistemo plej simila al esperanto estis la metra sistemo. Inter aliaj aferoj ĉar ambaŭ estis homaj elpensaĵoj kaj pro la fakto, ke ili estis kreitaj por esti utilaj al la tuta homaro. Kurioze, samtempe al la kutima kritiko kontraŭ esperanto ke la zamenhofa lingvo estas homa elkreaĵo, oni tute silentas tiun saman kvalifikon se oni parolas pri la metra sistemo.



Okaze de la Franca Revolucio la Akademio de Sciencoj de Parizo proponis la adopton de adekvata sistemo de mezuroj kaj pezoj utilaj por la scienco kaj la komerco. Post multaj studoj la Akademio rekomendis, ke la nova mezuro devus esti bazita en la dekmilionona parto de la distanco ekzistanta inter la Norda Poluso kaj la ekvadora linio. Tiu mezurunuo nomiĝus metro.

Por kalkuli ekzakte kiom longe estus la metro estis necese mezuri tiun distancon. Tiun taskon devus realigi la francoj Jean Delambre kaj Pierre Mechaini. Malgraŭ la akraj militoj inter Francio kaj la najbaraj regnoj ili, dum ses jaroj, mezuris la distancon inter Dunkerko kaj Barcelono. Evidente tiu distanco ne similis al tiu ekzistanta inter la Poluso kaj la Ekvadoro, sed utilis por kalkuli ĝin proporcie. Kompreneble, la difino ke la metro estas la dekmilionona parto de la tera kvadranto ne estis tute ekzakta, ĉar la Tero ne estas perfekta sfero, tamen tiun detalon oni ne priatentis ĉar oni supozis, ke la Naturo estas io perfekta. Sed post 7 jaroj da studado kaj vojaĝoj oni prezentis oficiale antaŭ la francaj aŭtoritatuloj stango el iridio mezuranta ekzakte unu metron, kiu laŭ la aserto de la tiutempaj sciencistoj devus utili *por*

ĉiuj popoloj, por ĉiuj tempoj. Malgraŭ ĉi tiu oficiala adopto eĉ en Francio mem oni ne ekzuzis la novan sistemon tuj. Tiel, Napoleono devis permesi la uzadon de la mezepokaj regionaj mezurunuoj kaj nur en la jaro 1840 la metro fariĝis la sola leĝa mezurunuo en Francio.

Hodiaŭ, malgraŭ la fakto ke en multaj regionoj kaj landoj ankoraŭ ekzistas propraj mezurunuoj, kelkaj tute oficialaj kiel en Britio la mejlo aŭ kutimaj kiel en Hispanio la fanego, oni povas aserti, ke la uzado de la metra sistema estas io ĝenerala en la tuta mondo, kaj eĉ en Britio oni scias, ke la mejlo egalas al 1.609 metroj se temas pri surtera mezuro kaj al 1.852 metroj se oni parolas pri mar-mejlo.

Nu, kaj kiu rilato ekzistas inter esperanto kaj la metra sistemo? Nu, mia bona amiko Tomás Caspe klarigis al mi tion multfoje.

1) ambaŭ sistemoj, la lingvo esperanto kaj la metra sistemo, estas elpensaĵoj de sciencisto.
2) Ambaŭ sistemoj deziras utili kiel internaciaj gvido-punktoj, esperanto ĉar utilas por la internacia komunikado kaj la metra sistemo ĉar ĝi utilas al la internacia komprenado de distancoj, enhavoj, ktp.
3) Malgraŭ la fakto, ke ambaŭ sistemoj pretendas esti internaciaj gvido-punktoj, neniel tio signifas, ke ili anstataŭigas ĉu naciajn lingvojn ĉu kutimajn mezur-sistemojn. Ĉi tiel se esperanto utilas kiel internacia komprenigilo por diverslandaj personoj, tio ne signifas, ke iliaj lingvoj malaperus. Same, malgraŭ la uzado de la metra sistemo tio ne signifas la malapero de kutimaj mezur-unuoj (la mejlo, la fanego... ankoraŭ ekzistas).
4) Se paroli pri la ebla artefariteco de la metra sistemo kaj/aŭ de esperanto, la metro estas distanco kiu efektive ekzistas en la Naturo, temas pri la la dekmilionona parto de la distanco ekzistanta inter la Norda Poluso kaj la ekvadora linio. Same, esperanto baziĝas sur la komunaj elementoj de diversaj ekzistantaj lingvoj.

Malgraŭ ĉi tiuj kialoj, pravaj mi pensas, neniu dubas pri la taŭgeco de la metra sistemo, neniam mi aŭskultis plendojn bazitaj sur la arbitraritaĵo konsideri la dekmilionon an parton de la tera kvadranto kiel internacian referencon, kompreneble oni povus diskuti ĉu estas pli konvene konsideri ne la dekmilionon an sed la dudekmilionona aŭ la tridekmilionona.... Male, kial ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj kritikas esperanton sub la akuzo esti artefarita aŭ pri la arbitraritaĵo baziĝi sur okcidentaj elementoj kaj ne sur ĉinaj aŭ japanaj? Kial oni adoptas senprobleme la metran sistemon sed ne la internacilingvan sistemon????

DIALOGOJ KUN MIA EDZINO

Stranga Konversacio

Mi. Ĉi tiu stranga konversacio, sendube en aliaj hejmoj aŭ por multaj miloj da personoj, ĝi estus tute normala ĉar aktuala kaj interesa. Nu, la aludata konversacio temas pri futbalo. Do, nenia strangaĵo, sed okazas, ke en nia hejmo, pli bone dirite, en nia familio tiu modernaĵo por pasigi la tempon kaj eĉ amuziĝi ne estas –uzata-. Do, eble, la strangaĵo, estas ni. Ĉu? Nu, la fakto estas ke la alia tago, mia edzino kaj mi dediĉis multe da tempo al ĉi tiu fenomeno de la socio. Nekompreneble ni faris tion, sed ni ĝin faris, tio estas la vero. Ni hontas pro tio, ke ni dediĉis parton de nia multvalora vivo al tio nomata futbalo.

Ŝi. Ŝajnas al mi, ke iom post iom vi falas en la saman frenezecon, ol tiuj, kiujn vi spektas per la televido. Ĉu vi ne konstatas kiel ili ĉiuj krias kvazaŭ frenezaj? Mi ilin ne povas kompreni, kaj mlapli mi povas kompreni, kial ili tiom kriaĉas. Ĉar vidi viron piede bati pilkon kaj poste kuradi post ĝi, mi ne vidas la kialon por tiom da feliĉo aŭ disreviĝo, kiam la kuranto, ne trafas ĝuste la pilkon. Mi pensas oni ne bezonas esti tre inteligenta por tion fari.

Mi. Karulino mia, vi jam scias, ke vi ne interesiĝos pri tiu spektaklo, kvankam la plimulto da homoj nomas ĝin sporto. Sed la vero estas, ke granda, mi eĉ dirus ke grandega kvanto da personoj fervore interesiĝas pri tiu sporto-spektaklo. Kaj mi ofte pensas, ĉu ni eraras pro nia teniĝo?

Ŝi. Ho ve! Patrino mia. Mi baldaŭ vidos vin inter tiu homamaso krianta, kvazaŭ la tero fendiĝus kaj ni ĉiuj estas englutitaj en ĝian internon. Vi jam scias, ke mi absolute ne interesiĝas al tiu sporto. Mi pensas, ke ĉiuj ili suferas je ne danĝera kolektiva mensa malsano, kvankam, en iuj kazoj montritaj kiam oni sciigas la mondajn novaĵojn, mi devas eĉ ŝanĝi mian opinion, ĉar veraj bataloj okazas inter du aŭ tri bandoj. Feliĉaj ni estas, ke niaj familianoj absolute ne interesiĝas al tiu distraĵo.

Mi. Nu, vi ne tiom koleru, ĉiu rajtas sin amuzi laŭvole. Eble se ni studus iomete la kialon kaj regulon de tiu piedpilka ludo, ni metus plian intereson kaj ni fariĝu fervoraj amantoj de la futbalo.

Ŝi. Ĉu vi intencas moki min? Ĉu vi opinias, ke ne sufiĉas la penado lerni la akuzativon, de nia kara Esperanto, kaj ankoraŭ vi deziras, ke mi lernu la regulojn de tiu sporta ludo? Iufoje, kiam mi ŝanĝas la televidan kanalon, subite aperas (ĉar mi pensas, ke tiu futbalo estas konstanta programo en preskaŭ ĉiuj televidaj kanaloj), nu, aperas sinjoro, vestita en nigraj vestaĵoj kaj kun mallongaj pantolonoj, kiu per fajfilo regas la situacion. Nu, tiu sinjoro fajfas kaj ĉiuj ludantoj ĉesas kuradi, poste li metas la pilkon en konkretan lokon, li fajfas denove kaj jen ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj kurantaj post la pilko. Ĉu ili ne estas iomete frenezaj? Intertempe la fervoregaj spektantoj iuj aplaŭdas kaj aliaj protestas. Stranga socia fenomeno.

Mi. Mi jam scias, ke mi ne estas fakulo pri futbalo, ke ankaŭ ne tiu nomata sporto interesas min, sed permesu al mi iomete ĝin klarigi laŭ miaj malmultaj scioj pri la afero. Tiu sinjoro kun nigraj vestaĵoj, ne signifas la morton, kiel multaj homoj pensas, li estas la arbitraciisto, li estas la maksimuma aŭtoritato kaj konas ĉiujn regulojn. La fajfilo estas por atentigi la futbalistojn pri filudo farita. Jes, mi ankaŭ pensas, ke se tiu sporto estas tiom honesta, kiu dignigas la homon, laŭ mi ofte aŭskultas, kial tiuj futbalistoj agadas tiom malbone edukitaj?

Ŝi. Ni forgesu tion pri la reguloj de la futbalo en la terenludo. Ĉar mi deziras scii, ĉiu iu kapablas min konvinki, kial tiuj sinjoroj, kiuj pli ol malpli efike kuradas post la pilko havas salajrojn astronomiajn. Mi jam legis en ĵurnalo, ke iu el tiuj profesiaj futbalistoj ricevis tri milionojn da pesetoj TAGE! (Pardonu min, se mi ne uzas nian belan kaj karan monunuon la eŭron) Kian sumon ,patrino mia! Jara salajro de laboristo ne atingas tiun nekredeblan sumon, kiun iu futbalisto ricevas ĉiutage. Kaj ankoraŭ, estas iu, kiu volu min konvinki, ke tiu futbalo ne estas skandala sporto, kiu rajtas nenian atenton de la civitanoj? Ĉu oni povas kredi, ke simpla laboristo iras al stadio kaj elspezas parton de sia salajro por ke tiu DIA futbalisto ricevos tri miljonojn da pesetoj ĉiutage. Konscia civitano ne povas ĝin subteni.

Mi. Kaj krome estas alia detalo, kiun mi ne komprenas. La sekvantaro de tiu aŭ alia teamo apogas siajn urbajn futbalistojn. Mi tuj pensas, ke la futbalistoj de tiu menciita urbo, estas naskiĝintaj en la urbo mem aŭ almenaŭ en ĝia zono, sed tute ne, la plej granda parto de la futbalistoj venas de aliaj lokoj kaj de aliaj landoj. Do, tio estas io nekomprenebla. Laŭdire, nur la futbalistoj de unu hispana teamo naskiĝis en la urbo mem aŭ ĝia zono.

Ŝi. Nu, ĉu vi ankoraŭ ne konvinkiĝas, kiom danĝera estas tiu sporto por la menso de la homoj?

Mi. Tamen, io devas ekzisti, ia "kurento" ne videbla kunligas ilin, kiam tiom da rangaj instancoj fervore subtenas tiujn piedpilkajn teamojn. Kaj se hazarde oni atingas venkon, kaj manifestacioj de entuziasmo, de fervoro, de amo al la teamo, al urbo, al la aŭtoritatoj. Ĉu vi kara edzino, ne envias tiujn homojn, kiun tiom simple, sen nenia zorgo trovas la feliĉon? Ĉu ankoraŭ vi pensas, ke ili suferas –kolektivan mensan malsanon-?

Ŝi. Ne, mi ne konvinkiĝas pri tiu stulta ludo, pro kiu oni elspezas tiom amaso da mono. Kuradi kaj puŝi piede pilkon estas nenia saĝeco, por ke la homoj freneziĝos tumaniere. Dume en la lando mankas mono por bonaj sciencistoj, sanigaj rimedoj, laborlokoj, k.t.p.

Mi. Mi scias, ke al vi plaĉas la opero kaj klasika muziko, ĉu vi pensas, ke pro tio vi estas pli racie edukta ol tiuj personoj, kiuj iras spekti futbalmaĉon? Kaj ankoraŭ, ĉu tiuj futbalamantoj estas malpli inteligentaj ol tiuj, kiuj dediĉas sian tempon al Esperanto?

Ŝi. Kara mia, ĉu vi celas, ke ni eksgeedziĝu? Ĉar kompari la amantojn de la opero al tiuj kriaĉuloj de la futbalo, kaj plej grave kompari Esperanton al futbalo, kaj plej grave kompari Esperanton al futbalo, ĝi estas insulti la edukon, la progreson kaj la homan kunvivadon.

Luis Serrano Pérez

Jen interesega NOVAĴO !!!!!!!!!

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kunlabore kun la denove funkcianta Sevilja Esperanto-Asocio planas organizi renkontiĝon en Sevilo simila al tiamaj Andaluzaj Kongresoj de Esperanto. La renkontiĝo okazus dum semajnfino (sabato kaj dimanĉo) aŭ nur dum sabato de la monatoj septembro aŭ oktobro. Aktiva grupo de sevilaj samideanoj jam eklaboris por proponi al ĉiuj esperantistaj andaluzoj partoprenindan programon. Sur la venontaj numeroj de *Gazeto Andaluzia* oni sciigos pliajn detalojn de ĉi tiu, ankoraŭ, projekto. Tamen, se eble, rezervu semajnfinon de tiuj monatoj por praktiki esperanton kaj prikonsideru la eblecon veni en Sevilon.

Neprisilentaĵoj Lastmonataj

LA EKSKURSO DE AZENO EL VELEZ RUBIO
(Gravito de la Vivo)

D-ro W. Gunther

Venis ĉarma kurento el la centraloj konvenaj al la periferioj konvenaj. Kirlita la aero en ĉiuj altoj & vivo ade 1- & 2-ope sen & kun butonoj premendaj. Plus akvon, la legomoj ja estas freŝproduktoj... De Atlantido al Polaroido, de Adelaido al asteroiod, de sigmoido al hemorido, de aldehido al koincido, de televido al invalido... & ne forguesu konvinkan etikedon ! Pordoj apertaj, oreloj & buŝoj, maroj, manoj, koroj, foroj (Ne mankas kuraĝo, sed ebleco.) boteloj por fontoj (Memstareco & memrespondeco!), giĉetoj al ontoj (Neniam la malĝustan, sed rare la ĝusta mondo (Li estis sen prizono & ŝi diris ĉionbonan.)... Dume la Andaluza azeno trotis de Velez Rubio al Munkeno, sia apoga urbo, oktobrofestivalen. Jen la infanoj de Dio, la distancemuloj, la ĉiuj uloj de la fortunranda ankoraŭo, la fiksitaj & disiĝemaj samtempuloj... Sonoras sonoriloj & enspiriĝas aero por bonkvalita Sankta Manĝo –ne estas realigio, kiu ne pravus. Estas limoj & ties transpaŝoj, estas ekvilibroj & ties disfaligoj, estas malplioj & ties likvidoj, sed ne estas religioj, kiuj ne pravus... Ĉi Planedo –tirkesto de Diaj infanoj, najbaro kun pulmokancero, fremdulo kun plensukceso, drinkulino kun psika metamorfozo, estetikulino kun memasimilemo, akvo & pano, supo & pomo... La azeno marŝas kaj frapas al la pordo de apud-asfalt-trotuara domego, ĉetabliĝis & provis savi sian aferon & fine ricevis sitelon da biero & la banĉambron & tie forgesis sian skatolon kun la ŝminkaĵoj _ĉar vere Gi ja estis azenino, la eĉ pli raraj maskoj ne pritrotas Eŭropon. Iu pro ekstrema afableco metis la bonodoran tuton en flavan Jiffy-koverton kun internaciaj respondkuponoj – krom mono ankoraŭ restas bonvolo, eĉ bonvolemo, en ĉi katastrofe ekskuzema praa kosmejo... Ŝi provis la negocon pri supervivado en Strasburgo, en kies Eŭropa Parlamento troviĝas tutvera vertuto de ĉi kontinento. Kiel virino ŝi ŝatas virojn, kiuj ne bezonas sukceson. “Nian malsanon ni mem elektos. Ne necesas destino, sed garantiita vivloko!” Ŝi diris nome de siaj samsortuloj & parlamentano el sia subtena metropolo Munkeno respondis: “Ne paniku, mi petas! Ni certe ĉeos!"... & ŝi en la mitingo

finfinis per sociforumema mesaĝo: "Pli rozaj la tempoj & malpli flavaj la paĝoj!" La idealoj ne estas ludoj kiel en "Paflinie". Nur: Ŝi estis vana, vigla & senarmila. Survoje al oficiala konfirmo... Privata kafo, telefonadi por nenio, lakto por mordi, la nova kasisbonbono, kvalifikita fajrobrigado & kvalifikita fajnlavado, la eenca kontraŭ kuloj & ĉio kun iom da nealergigaj sukeranstataŭiloj transgenaj. Transpaŝoj, disfaligoj & likvidoj. Faruloj & viktimoj, kelkaj sanktuloj... Naskita por si mem, ŝi, revene al Velez Rubio, timpensis pri la sociala involuo de sia utero, ne povis trovi kulpulon pri la biologio, portempe emis revizii ĉion pri sia destino & starigis la finan demandon (& ĉiuj nun ja tiele starigas): "Ĉu la gravito gajnos aŭ la ekspansio?" Ŝi ŝatis esti mezurebla azenino & tion ne nur en Andaluzio. Ŝi bezonis hejman herbejon & ne malplenan, malvarman, malhelan kosmon, la graviton de vivo...

NULA HORO
Iak (Don Mail)
03-10-10 & henume

63a Hispana Esperanto-Kongreso
kaj 6a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso
BILBAO
de la 25a ĝis la 29a de aŭgusto 2004
Fakultato de Ekonomiaj Sciencoj
Avda. Lehendakari Agirre

Programo

Merkredo 25a: akcepto de la kongresanoj, gazetara konferenco, malfermo de la Kongreso. Prelego pri Bilbao / Biskajo. Interkona Vespero.
Ĵaŭdo 26a: Prelegoj dummatene. Vespere ekskurso al Portugalete, Muzeo Guggenheim. Oficiala Bankedo.
Vendredo 27a: Prelego. Akcepto de la kongresanoj en la Urbodomo. Lunĉo. Oficiala Foto. Ekskursoj.
Sabato 28a: Kunsido de Hispana Esperanto Federacio kaj de aliaj asocioj. Fermo de la Kongreso. Spektaklo en teatro de Bilbao.
Dimanĉo 29a: Tuttaga ekskurso: Bilbao-Gernkia-Mundaka-Bermeo-Lemoiz-Getxo-Bilbao.

Konstanta adreso: Grupo Esperantista. Barrencalle Barrena 7-1 D 48005 BILBAO. Tel. 944164492 ; 696613958 ; esperantobilbao@terra.com

INTERLINGVISTIKO

FRENDO

Kiel jam ofte dirite sur la paĝoj de ĉi tiu rubriko, la elpensado de novaj lingvoj kun la pretendo utili kiel komunikilo por la tuta Homaro ne estas io apartenanta al pasintaj jarcentoj. Tute male, eĉ en la lastaj jaroj aperas novaj projektoj de internaciaj lingvoj, kaj kompreneble ankaŭ en Hispanio.

Unu el tiuj projektoj nomiĝas *FRENDO.* Alonso Churruca estis hispano, loĝanta en Palencio, kiu en la jaro 1947 ekigis sian laboron por la kredado de internacia lingvo. Komence de la 70a jardeko li diskonigis sian laboron pere de la libro *FRENDO, Ensayo sobre una Lengua Universal* (Andorra, 1973). Verŝajne li publikigis sian laboron por ke ĝia projekto povus esti konsiderta de la brita parlamentano S-ro Arthur Woodburn, kiu tiutempe prezentis leĝ-proponon ĉe la Brita Parlamento pere de kiu "oni devus studi la eblecon de la adopto de komuna eŭropa lingvo, bazita, plejeble, en la angla lingvo... La adopto de komuna lingvo, utila al Eŭropo kaj ankaŭ al la tuta mondo, estas necesa kaj urĝa".

Sur la antaŭparolo de sia verko Alonso Churruca diskonigas sian penson kaj opinion pri tio kio devas esti internacia lingvo kaj konkrete pri sian projekto *FRENDO.* La nova lingvo baziĝas ĉefe sur du lingvoj: la hispana kaj la angla. Kurioze oni povas trovi ankaŭ similaĵoj kun esperanto, tamen li ne mencias la zamenhofan lingvon en sia libro, (escepte de frazo en esperanto tradukita en frendon) malgraŭ tiu preskaŭ forgeso de nia lingvo kiel internacia idiomo mi pensas, ke Alonso Churruca sufiĉe bone regis esperanton kaj ankaŭ idon.

Post ĉi unua libro pri FRENDO nenio oni produktis plu pri ĝi kaj tiu nova projekto restis en la komuna sen-intereso.

GRAMATIKO

Alfabeto.
a-b-d-e-f-g-i-k-l-m-n-o-p-r-s-t
La sonoj de ĉiuj literoj estas similaj al tiuj en esperanto.

Artikolo.
Ekzistas nur la ne-difinitita artikolo UNA
una arbolo = arbo
arbolo = la arbo

Pluralo.
Oni adicias la literon S por formi la pluralon.
libros = libroj; *dogos* = hundoj;
dogas = hundinoj; *stonos* = ŝtonoj

Adjektivo.
Ĝi finiĝas per la litero A kaj ĉiam ĝi aperas antaŭ la sustantivo.
blanka angelo = blanka anĝelo
blanka angelos = blankaj anĝeloj
La adjektivo ne ricevas la finaĵon S por formi la pluralon.

Personaj Pronomoj.

Mi (viro) = *io*
Mi (virino) = *iu*
Vi (viro) = *to*
Vi (virino) = *tu*
Vi (viro kaj respekteme) = *bo*
Vi (virino kaj respekt.) = *bu*
Li = *lo*
Ŝi = *lu*
Ni (viroj) = *ios*
Ni (virinoj) = *ius*
Vi (viroj) = *tos*
Vi (virinoj) = *tus*
Vi (viroj kaj respekteme) = *bos*
Vi (virinoj kaj respekt.) = *bus*
Ili (viroj) = *los*
Ili (virinoj) = *lus*

Posesivaj Pronomoj.

Tute egalaj al la personaj pronomoj sed kun sufikso *da*.

Mia = *ioda* (se temas pri viro)
Mia = *iuda* (se temas pri virino)
Ŝia = *luda*
Nia = *iosda* (se viroj)
Nia = *iusda* (se virinoj).....

mia krajono = *ioda pensilo*
mia hundo = *iuda dogo* (mi = virino)
viaj arboloj = *tosda arbolos*

Verboj.

Readi = legi

AS-tempo
mi legas = *io readi / iu readi*
vi legas = *to readi / tu readi*
li legas = *lo readi*
ŝi legas = *lu readi*
ni legas = *ios readi / ius readi*

IS-tempo
mi legis = *io readed / iu readed*
vi legis = *to readed / tu readed*
li legis = *lo readed*

OS-tempo
mi legos = *io readoi / iu readoi*
vi legos = *tu readoi / iu readoi*
li legos = *lo readoi*

US-tempo
(verbo *amori* = ami)
mi amus = *if io amori / if iu amori*
ŝi amus = *if lu amori*
ni amus = *if ios amori / if ius amori*

U-tempo
legu ! = *readi !*

DEMANDOJ
Por formi demandan frazon estas necese meti la verbon antaŭ la subjekto.

Keri to readi da libro?
Ĉu vi volas legi tiun libron?
Se, io keri readi libro
Jes, mi volas legi la libron.
Ne, io keri ne readi da libro but if to preferi ios podi bui dis libro and una boligrafo in librerio.
Ne, mi ne volas legi tiun libron sed se vi preferas ni povas aĉeti ĉi tiun libron kaj bolkrajonon en la libro-vendejo.

Aliaj vortoj por demandi:
Kie = *Donde* Kiom = *Kuanta*
Kio = *Ko* Kiu = *kio / kiu*
Kial = *Kur* Kiam = *Kuande*

Donde esai otelo?
Kie estas la hotelo?
Otelo esai in Sentra-Skuaro
La hotelo esas en la Centra Placo

NUMEROJ

0 = sera 1 = una
2 = dua 3 = tria
4 = kua 5= kuina
6 = sesa 7 = septa
8 = okta 9 = nua
10 = deka 11 = dekuna
12 = dekdua... 20 = dudeka
21 = dudeka una 22 = dudeka dua...
30 = trideka 40 = kudeka
50 = kuideka... 100 = senta
124 = senta dudeka kua
200 = dusenta 300 = trisenta...
1.000 = milia 2.000 = dumilia
3.000 = trimilia... 1.000.000 = miliono
Unua = *une* Dua= *due*
Tria= *trie* Kvara= *kue*

PREFIKSOJ

- Fil = -ido
kabalo - filkabalo
ĉevalo – ĉevalido
- *Mis* = mis
mispensed = mispensita
- *Ne* = ne
nefakted = nefarita
- *Re* = re
refaktoi = refari
- *Sa* = ek
saplori = ekplori
- Un = sen
undolora = sendolora

SUFIKSOJ

- *ad* = agado de..
puerado = infan-agado
- *an* = an
kristano = kristano
- *ap* = estr
fabrikapo = fabrikestro
- *ari* = ar
librario = libraro
- *at* = posteno, rango
doktorato = doktorigo
- *as* = bato
sapataso = ŝuo-bato
- *er* = profesio (ne altlerneja)
panero = panisto
- *eri* = vendejo
librerio = libro-vendejo
- *es* = ec
feliseso = feliĉeco
- *ibl* = ebl
podibla = ebla
- *ink* = ej
sigarinko = cigarejo
- *ism* = ism
kristismo = kristanismo
- *ist* = profesio (altlerneja)
medisinisto = kuracisto
- *os* = oz
sudosa = svitoza
- *ust* = em
trabelusta = vojaĝema
- *or* = il
asendoro = levilo

EKZEMPLOJ

* Mi volas ĉokoladon kun lakto kaj biskvitoj.
io keri sokolato kum milko and biskuos

* Ĉi tiu infano ne parolas la anglan lingvon
Disa puero parli ne angla lango

* Bonvolu, kie mi povas legi ĵurnalon?
Per faboro, donde io podai readi una iornalo?
Jes sinjoro, mi konsilas al Vi legi ĵurnalon apud la parko.
Se, signoro. Io konsili Bo readi iornalo neare parko.

PRAKTIKU VI MEM
PRAKTIKI BOSELFO

La aŭtomobilo de mia patro estas rapida

_____

_____

(~~Auto of ioda fado esai rapida~~)

Ĉi tiu karto estas sekreta

_____

(~~Disa karto esai sekreta~~)

Mi preferas legi bonan libron

_____

(~~lo preferi readi una guda libro~~)

Ĉu vi parolas Frendon?

_____

(~~Parli to frendo-lango?~~)

lo desirai eati pano kum montekino

_____

_____

(~~Mi deziras manĝi panon kun butero~~)

Ŝi diris min, ke ŝi deziras aĉeti belan domon

_____

_____

_____

(~~Lu diked io lu desirai bui una formosa domo~~)

Likai Bo disa rumo?

_____

(~~Ĉu vi ŝatas ĉi tiun ĉambron?~~)

loda frendo esai felisa in Granato

_____

_____

(~~Mia amiko estas feliĉa en Granado~~)

Ni daŭrigas nian kompletan internacilingvan am-deklaran vortaron. Tamen, se ni havas frendo-parolantan amat (o)inon, sciu, ke ni povas diri "mi amas vin" laŭ 4 malsimilajn formojn, dependantaj ĉu viro amas virinon, virinon amas viron, viro amas alian viron aŭ virino amas alian virinon. Do, ni devus diri:

a) se viro amas virinon:
lo amori tu

b) se virino amas viron:
lu amori to

c) viro amas alian viron:
lo amori to

ĉ) virino amas alian virinon:
lu amori tu

Konsultinda Bibliografio rilate Frendon :

CHURRUCA, Alonso. *FRENDO, Ensayo sobre una Lengua Universal.* Andorra la Vieja, 1973.

VORTARO *Bokabulario*

Akvo	*akuo*	Ĵurnalo	*iornalo*	Tago	*dio*
Alia	*altro*	Kaj	*and*	Trinki	*drinki*
Ami	*amori*	Kelka	*alkuno,a*	Vidi	*bidi*
Amiko	*frendo*	Kiam	*kuande*	Virino	*manu*
Antaŭ	*before*	Kie	*donde*	Viro	*mano*
Aŭ	*o*	Kio	*ko, ka*	Vivi	*vivi*
Aŭdi	*audi*	Kiu		Voli	*kerai*
Aŭtomobilo	*auto*	Knabo	*iobento*	Vorto	*bokabulo*
Bela	*bela*	Knabino	*iobentu*		
Birdo	*birdo*	Kun	*kum*		
Blua	*blua*	Labori	*labori*	Semajno-tagoj	
Bona	*guda*	Letero	*karto*	*dios of uiko*	
Bone	*gude*	Libro	*libro*	*mondi*	
Ĉar	*kar*	Lingvo	*lango*	*tuesdie*	
Ĉiam	*senpre*	Longa	*longa*	*uednesdio*	
Ĉi tie	*dise*	Maljuna	*Olda*	*tursdio*	
Ĉi tiu	*da*	Manĝi	*eati*	*fridio*	
Danci	*dansi*	Mano	*ando*	*satudio*	
Dankon	*mersai*	Maro	*seo*	*sundio*	
De	*of*	Mateno	*morno*		
Devi	*musti*	Monato	*menso*	Monatoj de la Jaro	
Dika	*fata*	Ne	*ne*	*Mensos of anno*	
Dio	*Godo*	Neniam	*nunkagain*	*ianuaro*	
Domo	*domo*	Nomo	*namo*	*februaro*	
Doni	*gibi*	Nova	*nova*	*marso*	
En	*in*	Pano	*pano*	*aprilo*	
Esti	*Esai*	Paroli	*parli*	*maio*	
Facila	*fasila*	Patrino	*fadu*	*iunio*	
Fantazio	*fantasio*	Patro	*fado*	*iulio*	
Flugi	*abioni*	Per	*per*	*agosto*	
Forta	*forsa*	Persono	*persono*	*septenbro*	
Frato	*fratro*	Por	*prof*	*oktobro*	
Frua	*earla*	Post	*tras*	*novenbro*	
Granda	*biga*	Povi	*podi*	*desenbro*	
Havi	*abi*	Pri	*about*		
Hodiaŭ	*todie*	Rapida	*rapida*		
Homo	*homo*	Respondi	*respondi*		
Infano	*puero*	Seĝo	*stulo*		
Inter	*inter*	Skribi	*skribi*		
Iri	*gi*	Studi	*studii*		
Jes	*se*	Sinjoro	*segnoro*		
Juna	*iubenta*	Sub	*on*		

Paĝoj pri nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

La 44a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo (1)

En la jaro 1984 okazis en Sevilo la 44a Hispana Kongreso de Esperanto. Disvolviĝis la renkontiĝo de la hispana esperantistaro en varmegaj sevilaj somer-tagoj, inter la 7a ka la 11a de julio. Oni okazigis interesajn programerojn, inter ili oni povas elstarigi la prelegon "Esperanto inter la planlingvoj", fare de la Prof. Manuel Ramírez Cepeda, prezidanto de la Organiza Komitato; "Seviljo kaj la Andaluza Kulturo" de la D-ino Rafaela Urueña kaj "Rolo de Esperanto en la Sociaj kaj Ekonomiaj celoj de la Turismo" de Manuel Figuerola. Ĉeestis en la dua tago de la Kongreso Mª Angeles Infante kiu deklaris, ke sia patro Blas Infante, patro de la andaluza patrujo, lernis esperanton kiam li estis notario en la sevila vilaĝo Cantillana, li eĉ estis individua membro de Universala Esperanto-Asocio.

Unu el la plej interesaj programeroj de la Kongreso estis la "Artaj, Sciencaj kaj Kulturaj Horoj", ili konsistis el prelegoj faritaj de kongresanoj pri konkretaj temoj. Ĉi tiel, dum la Kongreso oni parolis pri `Geografiaj nomoj en e-o´ fare



La organizantoj de la 44a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo



Partoprenantoj en la 44a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo


José M. González Aboin; `Palindromoj en la hispana kaj en esperanto´de Jorge Camacho; `Elementa Enkonduko en mikrokomputandon´de Miguel A. Sancho; `Gravaj prononcoeraroj de la hispanaj esperantistoj´de Rikardo F. Albert Reyna; `Kiel oni pretigas libron por eldono´de Miguel Gutiérrez Adúriz; `De abako ĝis komputilo´de Antonio Alonso Nuñez; `Kantabrio aŭtonoma, kial?´de Juan Azcuénaga; `Kultivado de vinbero kaj ŝanĝo de ĝi al vino´de Enrique Arnau; ´Logiko kaj lingvo, similaĵoj kaj malsimilaĵoj de Manuel Ramírez; `Esperanto, facila lingvo sed ĉu facile instruebla?´de Edward D. Keefe. Post la prelegoj, normale 20-minutaj, okazis debatoj inter la preleganto kaj la publiko. Ĉi tiuj prelegoj estis interesaj kaj pro tio ili reokazis dum la venontaj hispanaj kongresoj.

Okazis, kompreneble, la kutimaj programeroj rilataj al la organizado de la esperanto-movado en Hispanio kaj inter ili, tre interesa renkontiĝo de la respondeculoj en Hispanio de la produktado kaj eldonado de revuoj en la internacia lingvo. La amas-komunikikloj informis pri la okazigo de la kongreso en Sevilo kaj eĉ la andaluza delegacio de la hispana televido intervjuis dum kelkaj minutoj al la tiama Prezidantino de la Hispana Esperanto-Federacio, D-rino Rafaela Urueña, kaj eĉ oni uzis subtitolojn por tiuj frazoj de ŝi diritaj en la internacia lingvo.

Kompreneble ne ĉio dum la Kongreso estis oficialaj aktoj. Ankaŭ okazis amuzaj distraĵoj, la folklora grupo "Maruja Garrido" dancis la tipajn *sevillanas.* La lasta tago de la Kongreso la partoprenantoj vojaĝis al la urbo Jerezo kie oni vizitis tipan kelon. Oni vizitis ankaŭ la vilaĝon Arcos de la Frontera, dirite la plej bela en Hispanio, kaj dumvespere la kongresanoj profitis viziton al la plaĝo *Valdelagrana* en Puerto de Santa María (Kadizo) por trankvile promenadi tra la marbordo, kaj kelkaj eĉ por ĝui banon en tiu plaĝo.

Nu, bonega okazo por praktiki la lingvon en etoso modele organizita de la sevila esperantistaro.

[1] (*Noto de la Redakcio)* Ĝis kiam la nova refondita Esperanto-Asocio de Sevilo adoptos oficialan nomon por la urbo Sevilo (ĉu Sevilo, ĉu Seviljo) sur la paĝoj de *Gazeto Andaluzia* daŭre aperos la nomon"Sevilo", ĉar ĉi tiel aperas la nomo de la andaluza urbo sur la "Plena Ilustrita Vortaro". Se temas pri aludo al la asocio mem, ni scias, ke ĝia nomo estas "Sevilja Esperanto-Asocio", do tion ni aperigos. Tuj post la momento kiam la grupo decidos la nomon de la urbo en esperanto ni akceptos tiun decidon kaj oni uzos en *Gazeto Andaluzia* la eblan novan nomon.




Historia Arĥivo de
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 611
14080 CÓRDOBA
esperanto14@supercable.es

Konu la novan refonditan SEVILJA ESPERANTO-ASOCIO-n

se Vi loĝas en Sevilo la asocio renkontiĝas ĉiusabate je la 10´30 horo matene ĉe la fontano de la Placo *Encarnación.*

S.E.A.



a. (akuzative kaj plurale) Abstrakta koncepto de la spirito pri objektoj aŭ ecoj. **b.** Palmipedo simila al anaso. **c.** mi kontraktis por ricevi dum difinita tempo gazeton. **ĉ.** Ambaŭ seksoj; moviĝi de iu loko al alia. **d.** Inverse, japana urbo. **e.** (akuzative) resenda pronomo de la tria persono.

1. mi ree prezentos al mi en la spirito antaŭe viditajn bildojn. **2.** Enskribi en konton la ŝuldojn de iu. **3.** Elemento de tutaĵo; sufikso uzata por derivi numeralojn, el kiuj ĉiu prezentas parton de koncerna nombro supoze dividita en tiom da egalaj partoj. **4.** (inverse) Birdo kun mallonga beko kaj tre fleksebla kolo. **5.** (inverse kaj plurale) Laŭtaj akraj voĉsonoj. **6.** Finaĵo de la akuzativo; resenda pronomo de la tria persono.

La solvo de la jena krucvortenigmo aperos sur la venonta numero.

Post la gravo 3
(Strangola povrumo)

la hamburgero Obtuza
(Rendevuo kun fueloj & bremsoj)

Ĉu sufiĉas
havi sonĝon,
se mankas tempo
por respondoj?
Ĉu sufiĉas esti eksperto,
se ja havatas kulero,
sed ne siropo?
Farsaj la ekvi-
limoj & -libroj ,
Ĉiu nova karno
softvare diluatas...
(Samtempe gasi & bremsi.)
La onta umultro
hodiaŭ defias nenion
& la libereco ĉiam
pli grandas ol scioj.
Tro multe da breto &
tro malmulta klorofilo.
La vico estas la via!

(Gefratoj, la tempo venis decidi, ĉu vi iĝantas la problemo aŭ
la solvo...
Necesas 5 sekundoj por ekkoni vian celon sur ĉi Planedo...
- Motor City 5, 1968)

Lupiro el Anavalo & Kesado
(Don Mail de NULA HORO – guardamARTE)
en la 2004-an
& bonan eskapon necesokaze.

ALTA KOMISIITO DE NACIOJ UNUIĜINTAJ POR LA RIFUĜINTOJ

Monata mon-kontribuado estas la plej efika maniero helpi ĉar:

✓ la rifuĝintoj ricevas kontinuan helpon, ĉi tiel oni povas oferi helpon ne nur hodiaŭ, sed ankaŭ morgaŭ, la venonta monato, la proksima jaro...

✓ la monon donacitan ricevas direkte utilas por helpi la rifuĝintojn, anstataŭ pagi poŝt-kostojn kaj administrajn aferojn.

✓ Vi povas kontroli viajn mon-donacojn. Vi povas pligrandigi, malpliigi, provizore haltigi aŭ meti finon al via kontribuado kiam vi konsideros tion oportuna.

✓ Vi ricevas atestilon por ke vi povos rabati la 25% el viaj mon-donacoj en via jara enspez-imposto.

✓ Solidariĝi kun la rifuĝintoj pere de monataj mon-donacoj al AKNUR estas la plej efika maniero plibonigi iliajn viv-kondiĉojn.

✓ Vi ricevas periodikan informadon pri kiamaniere AKNUR uzas vian donacitan monon.

KIEL VI POVAS FARI TION ?

La plej komforta maniero monate mon-kontribui estas enbankigi viajn donacojn

ALIĜU VI HODIAŬ

eĉ malgranda sed kontinua mon-kontribuado
estas granda helpo tie kie oni ĝin bezonas

AKNUR
la agentejo de NU por la rifuĝintoj
hispana komitato


ANDALUZA LITERATURO

(tradukita en esperanton)

ALIA PASIA KRIMO

(el *Sesteto de Ibera Amo*)
de Fernando Quiñones
trad. J.M.R.H.

Dum la monato februaro 1964 ĉe centra kafejo en la urbo P. Germanio (fama urbo pro la jarcenta produktado de romantikaj komponistoj, religiaj art-objektoj kaj milit-materialo), laboristo de la provinco Jaeno, dudekdujaraĝa, kaj studantino de Biologiaj Sciencoj, deknaŭjaraĝa landidino, konatiĝis hazarde.



La junulo sorbis rudimente kaj brue sian kafon; ĉe la tujapuda tablo, ŝi, tre bela, fine devis rigardi kaj ŝi sentis internan vipo-baton, tamen tio ne estis io nova, kiu kortuŝis sin el la piedoj ĝis la kapo. Tiam, la junulo, bruna kaj grandokula besto, notis ŝian atenton kaj sendis al la nekonatulino okul-signon, ŝi respondis movante en la aero malrapidan sed esprimeman manon.

Kiel fatale oni vidos poste, tiel mallongaj elmontroj ne finiĝis tie: tio okazis je la oka matene; je la oka kaj duono vespere, la Suda socia iredentulo kaj la barbarulino de la brumoj ege amuziĝis ĉe apartamento en la *Schumannstrasse*, tuj pruntedonita por tiu momento de du amikinoj de la junulino.

Ĉi tiuj renkontiĝoj daŭris tri, kvar pasiaj monatoj. Ĉiu ero de tiu asocio sen-scie serĉis en la alia parto tion kion ili ne trovis en si mem, komuna kaj ne-negativa sento. La junulo serĉis en ŝi la rafinitecon de la manieroj, la facil-movecon, la glatecon de ŝia korpo –kvankam io asepsa- kaj ŝia etoso. Ŝi en li, la rudimentaran kaj bizonan impeton, la pasion, la imperion de tiuj manoj ĝoje sovaĝaj kaj obskuraj, regemaj. Tamen, la amo por ŝi estis io grava sed normala, kaj por li estis novaĵo solena, blindigema kaj definitiva, io lontana kaj por la lontaneco, apenaŭ rilata al la patrino kaj al la geavoj kaj tiuj fora hejmo apud la olivarbaro, sub la neperturbebla bluo.

Laŭ tiu ĉiam estimataj informoj de la specialisto pri animoj O. Schlesswig-Dalida, la ŝlosilo de tio kio okazis estas tiu diferenco de kriterioj. La juĝistoj, devigitaj solvi, ne lasis preni en konsideron la delikatajn kialojn de Schlesswig-Dalida, sed ili decidis, ke temis pri la klasika ekzemplo de provizora cerba perturbo de pasia naturo.

Tamen ni ne devas antaŭdiri la fajnan realon de la faktoj rapide disvolvigitaj pro la rapida enuo de la knabino. Malpliiĝitaj al normala kutimo la amaraj allogoj de la andaluzo, la knabo komencis esti al ŝi tro malkomforta, ĉefe pro la kutimaj horoj. Ŝi ne sciis, ĉu li pensis en io ; li tute ne konis Goethe-n, la Komunisman Partion, Betovenon, Hitleron, Uwe Seeler-n, Bertol Brecht aŭ al Joan Baez.



Li uzis nur sepdekon aŭ okdekon da germanlingvaj vortoj kaj tiuj laŭvole, ĉu sence aŭ ne-sence, escepte *guten Abend* kaj *auf wiedersehen bis Morgen*; li estis neprezentinda ĉe la studenta etoso de la knabino (kiu komence montris lin tiuetose kun io da fiereco, kvankam ne tro multe, kvazaŭ li estus amika jaguaro aŭ bela sed danĝera plankto), neniun alian amuzaĵon li povus oferi al ŝi krom tiuj jam okazitaj.

Do, iuvespere, ŝi decidis forviŝi lin el sia vivo. Ŝi klarigis, pervorte kaj pergeste, ke ĉio jam finiĝis, kvankam ili povus resti kiel bonaj geamikoj. Ŝi adiaŭis lin per karesema vango-frapeto, ŝi ŝatis eĉ la ne-atenditan adiaŭon de la knabo, kiu foriris post tondra fermobruo de pordo sed kun ridego.

La postan tagon, lunde, li atendis ŝin kiel kaj kie kutime. Ŝi ricevis lin kun afabla sed ĝena malvarma ĝentilo, kaj post lasi lin ŝi estis tute certa, ke, finfine, ŝi komprenigis al li ĉion, ke okazus jam neniu problemo kaj, ke ne estus korekte adiaŭ lin sen fina omaĝo, akorda al tiuj feliĉaj okazintaĵoj kune vivitaj.

Sed marde, ŝi devis insisti pri la ne-konveno daŭrigi la renkontojn (ha libido, *feelings, Gefuhle*, Euripido, Arthur Miller, kia, kia praveco)

krome li konis iun speciala kaj konvena, matura inĝeniero, edzigita, bonege dotita kaj duon-franca, feliĉege nova por ŝi. Iomete surprizita, ŝi aŭdis kun senpacienca malatento la kompreneblajn protestojn "tute ne-eble, tute ne-eble!" de la ibero (kiu, kiel ni jam ĉiuj komprenis, enamiĝis verŝajne ĝisoste).

Merkrede, festotago, senespere pro lia obstineco, vespere ŝi atingis konvinki lin serioze, ke ĉio jam finiĝis sed ŝi ne atingis vidi la tri profundajn tranĉilajn pikojn de la porkapra poŝtranĉilo kiuj surterigis ŝin preskaŭ ĉe la pordo de ŝia propra hejmo.

Post tri monatoj, proksimume kvincento da enamigitaj virinoj, inter dekkvar kaj sesdek kvin jaroj, ĉiuj kun grandaj dozoj da instinkto, melankolio, adrenalino, enuo kaj kor-inklino al la akuzito kaj envio al la forpasintino, devis esti forpelitaj de la juĝejo kie, finfine, povis okazi la juĝo kontraŭ la viro de la amo laŭ la antikva formo.



Post "Gran Diccionario Español-Esperanto"
Jen alia bonega novaĵo

"ESPERANTO: Lengua y Cultura"

hispanlingve verkita de Antonio Valén. Ĉi 200-paĝa verko estos prezentata al la publiko dum la 63a Hispana Kongreso de Esperanto (aŭgusto 2004). Sed, oni povas jam antaŭmendi la verkon kaj ĝui grandegan rabaton.

ATENTU

Se vi, aŭ via grupo, mendos 5 aŭ pli da ekzempleroj, vi ricevos la libron kontraŭ nur 8 eŭroj. Se vi mendos unuope, t.e. nur unu ekzempleron por vi, vi ricevos ĝin kontraŭ 10 eŭroj. Lasta tago por akcepto de la antaŭmendo estas la 30a de junio. Se ĉi tio interesas al vi bv. kontakti kun la eldonanto Miguel Gutiérrez Adúriz liven@wanadoo.es

ANDALUZA KUIRARTO

JAENAJ ĈIFONOJ

La gado (seka moruo) estis la sola fiŝ-manĝaĵo kiu antikve oni povis manĝi en la internaj provincoj de Andaluzio, tio estas fore de la marbordo. Pro tio la gado, konservita en salo, estas la ĉefrolulo de kelkaj interesaj pladoj en Andaluzio.

Hodiaŭ ni prezentas la tiel nomata *Andrajos* (ĉifonoj) laŭ la jaena recepto. La vorto "ĉifono" komprenigas nin, ke temas pri plado kie oni amasigas diversajn kaj nemultekostajn ingredientojn.

Por 4 personoj estas necesaj:

- 250 gramoj da gado.
- 400 gramoj da faruno.
- Ajleroj.
- Kulero da dolĉa papriko.
- 3 tomatoj.
- Cepo.
- 500 gramoj da tapesoj.
- 7 kuleroj da oliv-oleo.
- Salo.
- Papriko.
- Safrano.
- Kumino
- Akvo.

Jen la farado:


Oni devas subakvigi la tapesojn por demeti la eblan salon el ili. Meti la farunon en sup-teleron kaj ankaŭ akvon kaj salon. Knedu la tutaĵon.

Versu la oliv-oleon en grandan paton kaj prepari fritaĵon kun la cepo, la ajleroj kaj la tomatoj. Post 10 minutoj metu la tapesojn kaj dispecigitan gadon. Ni miksiĝas bone la tutaĵon kaj poste ni versas ĉion ene de terpoto.

En pistujo ni pistos ajlon, safranon kaj kuminon. Ni versos akvon en la pistaĵon kaj iomete da salo. Ni adicios ĉi ĉion al la gado en la terpoto kaj du glasojn da akvo kaj plia salo. Ni metos la terpoton sur la fajro.

Ni glatigos la paston formita de akvo kaj faruno per rulo ĝis la atingo de maldika pasto. Ni tranĉos kvadratetojn da tiu pastaĵo. Kiam la pistaĵo (tomato, gado...) ekbolos adiciu la kvadrategojn ĝis nova ekbolo.

Metu la tutaĵon sur la tablo, prezentu ĝin ene de tiu sama terpoto.



FLAMENKO

Juanito VALDERRAMA

Antaŭ kelkaj semajnoj forpasis en Sevilo Juan Valderrama Blanca (Torredelcampo –Jaeno- 1916). Laŭdire, li estis la klasika flamenka kantisto plej grava kiu ankoraŭ disaŭdigis sian voĉon. Li naskiĝis en familio dediĉita al la terkulturo, sed li ankoraŭ infano, ĉiam sciigis sian pretendon esti flamenka kantisto.

En la jaro 1934 vizitis Torredelcampo, la vilaĝo kie li naskiĝis kaj vivis, la flamenkan kantistinon Dolores Jiménez Alcántara *La Niña de la Puebla*, kaj la patro de Juanito Valderrama (eĉ plenaĝe li ĉiam estis konata kiel Juanito Valderrama) akceptis finfine, ke sia filo akompanu ŝin ene de ŝia flamenka spektaklo. La premiero de Juanito Valderrama okazis en Madrido en la jaro 1935. Unu jaron poste komenciĝas la hispana intercivitana milito kaj Valderrama eniras en la respublikana armeo kie li kreas flamenkan grupon por amuzi la soldatojn kaj la vunditojn. Post la milito li kreas sian propran flamenkan kompanion kaj vojaĝas tra la tuta Hispanio kun sia spektaklo.

Juanito Valderrama sendube montris, ke la flamenko ne estas misakorda kun la koplo. Tamen, la plej purisma flamenkoj ĉiam konsideris lian kantadon kiel tro koplema kaj do, li ne estus pura flamenka kantisto. Sed li pruvis al ĉiuj ke bonega kantisto sendube



povas elstari en ambaŭ ĝenroj, flamenko kaj koplo.


Juanito Valderrama komencis sian karieron per la flamenko, lin ĉiam akompanis la plej bonaj gitaristoj. La pinto de sia kariero kiel flamenka kantisto estis tiuj kvar diskoj sub la komuna nomo "Historio de la Flamenka Kantado" kie li interpretas pli ol 50 malsimilajn flamenkajn stilojn.

Ĉe la kopla kantado kaj akompanita de sia popra orkestro, Juanito Valderrama atingis siajn plej grandajn triumfojn, sola kaj akompanita de sia propra edzino Dolores Abril. Li posedis voĉon longa, melodiema, tre agrabla kaj preskaŭ infana, eble pro tio li ĉiam estis konata kiel Juanito, ĉja nomo de Juan. Li endiskigis pli ol 300 kantaĵojn, multaj el ili komponitaj de li mem, eĉ oni diris, ke li estis la unua kantaŭtoro hispana, ĉar jam en la 50a jardeko li komponis kanzonojn poste amase disaŭdigitaj de la radioj kaj kantataj de preskaŭ ĉiuj en Hispanio.

Dum 60 jaroj li estis la unua figuro en la hispana koplo kaj li ĉiam estis respektata kaj amata de la publiko.

TURISMI EN .... *JIMENA DE LA FRONTERA*

3.000 horoj da suno jare kaj la agrabla mez-nombra temperaturo de 19 gradoj ne estas la solaj allogaĵoj de JIMENA DE LA FRONTERA, vilaĝo en la sudo de la provinco Kadizo. Tamen, ambaŭ aferoj faciligis la decidon de multaj eksterlandanoj kiuj, post mallonga restado en ĉi tiu urbo decidis loĝi tie definitive.




Araba Kastelo de Jimena

Preskaŭ ĉiuj popoloj loĝis en tiu zono. Oni konas surrokajn pentraĵojn en la loko nomita *La Laja Alta*, sed ankaŭ oni povas vidi arkeologiajn restaĵojn de iberoj, fenicoj, grekoj kaj punikoj. Dum la romia epoko la vilaĝo estis konata kiel *Oba*, ĝi estis profitodona terkultura zono por la abundo da akvo de la riveroj Gvadiaro kaj *Hozgarganto*. Sed la plej grava epoko en la historio de la urbo estas la islama konkero, tiam ĝi ricevis la nomon *Xemina* kaj ĝia kastelo, konstruita dum la 8a jarcento, poste estus grava loko en la bataloj de la landlimo (*Frontera*) inter kristanoj kaj islamoj.

En la jaro 1.465 la Sinjoro Beltrán de la Cueva konkeras la urbon por la Katolikaj Gereĝoj. Poste oni donacis, ne sen problemoj, al la Duko *Medina Sidonia*, kiu posedis la terojn ĝis kiam fine de la 19a jarcento la industria familio malag-devena *Larios* aĉetis la riĉajn terojn de Jimena de la Frontera.

En la jaro 1983 la urbo ricevis la honoran konsideron de "Arta kaj Historia Loko" pro siaj kulturaj vidindaĵoj, ne forgesante, kompreneble, ke la urbo stariĝas meze de la Natura Parko *Los Alcornocales*, kio pligrandigas la naturan kaj ekologian valoron de la zono. Laŭ opinioj de multaj vizitantoj Jimena de la Frontera estas la perfekta loko se oni serĉas trankvilan naturan paradizon.



Blazono de JIMENA DE LA FRONTERA

Ĉefaj Vidindaĵoj

* La Kastelo:
Starigita sur romia konstruaĵo la araboj konstruis ĝin en la 8a jarcento. Ĉirkaŭigita de ne-regulaj muregoj meze de ĝi stariĝas turo kun romiaj surrokaj skribaĵoj. Vizitinda ankaŭ estas la turo *Albarrana* kiu oferas belegan vidindaĵon de Jimena kaj de la tuta zono.

* Preĝejo *La Victoria:*
Konstruita kiel ofero de la Katolikaj Gereĝoj post la kristana konkero de la urbo, omaĝe al la Virgulino *La Victoria*, Patronino de Malago.



Preĝejo de la Virgulino *La Victoria*

* Sonoril-Turo de la Promenejo:
En la centra promenejo de Jimena de la Frontera stariĝas sonoril-turo, ĝi estas la sola restaĵo de la antikva preĝejo *Santa María Coronada.*

* La Baseno de la Maŭra Reĝino:
Sendube temas pri fabela nomo de tio kio estas antikva mozaraba preĝejo konstruita ene de rokego. La baseno al kiu rilatas la nomo, verŝajne aludas la sankt-akvujon de la preĝejo. Tamen, estas inde agnoski, ke la allogeco de la loko kaj de la nomo memorigas al nia fabelajn rakontojn.

Ĉefaj Festoj

Partopreninda karnavalo en la monato februaro. La dua semajno de la monato majo okazas interesa brutar-foiro, kie ankoraŭ oni vendas kaj aĉetas brutaron. Tipa foiro okazas la dua semajno de la monato aŭgusto. Kaj fine, dum la unua semajno de la monato septembro okazas la religia festo de la Virgulino Reĝino de la Anĝeloj.

Tipaj Manĝaĵoj

La zono oferas bongustajn manĝaĵojn, inter ili la *chantarella*, ĉapel-fungo kiuj kreskas en la ĉirkaŭaĵoj. Bongusta ankaŭ estas la *gazpacho majao*, loka varianto de la tipa andaluza *gazpacho*. Altkvalitaj estas la asparagoj kun kirlitaj ovoj. La tipa dolĉaĵo de Jimena de la Frontera estas la *piñonate* (speco de pin-sema nugato), ĝi estas araba deserto farita de faruno, oliv-oleo, mielo, migdaloj, pin-semoj, anizo kaj oranĝoj.

Venont-numere
TURISMI EN.....
ALMODOVAR DEL RIO
(Kordovo)

MISTEROJ KAJ LEGENDOJ DE ANDALUZIO

j.m.r.h.



Ĉu Walt Disney estis andaluzo?

Oni diras, ke en la jaro 1940a venis en la almerian vilaĝon Mojacar tri homoj en serioz-aspektaj vir-vestaĵoj. Ili asertis, ke ili estis reprezentantoj de la usona kompanio *Walt Disney* kaj ili serĉis la naskiĝ-atestilon de iu José Guirao Zamora, kiu naskiĝi en Mojacar en la jaro 1901a. Ili serĉadis dum kelkaj tagoj tiun atestilon en la preĝejo kaj en la urbodomo de la vilaĝo, tamen la civil-milito ĵus okazinta detruis ĉiujn tiutempajn dokumentojn.

En la jaro 1940a ekzistis en Mojacar nek elektro-lumo, nek telefono kaj kompreneble neniu en la vilaĝo konis kiu estis tiu *Walt Disney*. Tamen, ĉiuj en la vilaĝo memoris kiu estis Isabel Zamora, tiu bela lavistino kiu kune kun sia ĵus-naskita filo elmigris en la usonan urbon Ĉikagon, tie kie jam loĝis frato de Isabel. Laŭdire Isabel devis foriri el la vilaĝo por kaŝi sian eksteredzecan filon, kies patro estis la juna kuracisto de Mojacar.

Oni diras, ke la longdaŭra vojaĝo kaj la ekonomia nestabileco de la junulino helpis ŝian decidon lasi la filon ĉe respektindaj najbaruloj de ŝia frato, la Gesr-oj Elias kaj Flora Disney, kiuj jam havis tri gefilojn.

Verŝajne Isabel revenis en Hispanion, kie neniu povas certigi kiel daŭriĝis sia vivo. En Ĉikago la infano estis denove baptata en la monato junio 1902a kun sia nova nomo Walter Elias kaj ekde tiam li loĝis kun siaj novaj gepatroj kaj gefratoj ĉe la familio Disney. La mondo konus lin kelkajn jarojn poste sub la nomo Walt Disney.

Walt Disney mem neniam menciis ĉi parton de sia vivo, almenaŭ publike, ĉar laŭdire en la jaro 1946a okaze de kunlaboro inter Disney kaj Salvador Dali cele al la produktado de kelkminuta sekvenco ene del la dua parto de la filmo *Fantazio*, Walt Disney sciigis al la hispana pentristo, ke ili ambaŭ estis samnacianoj, ĉar verŝajne ankaŭ li naskiĝis en Hispanio. Krome, la oficialaj biografoj de Disney neniam pruvis tutcerte, ke li naskiĝis en Ĉikago.

Do, ĉu realaĵo ĉu mistero, tio kio vere gravas estas, ke eble la patro de dekoj da ĉefroluloj en la infanaj historioj naskiĝis en Andaluzio.

KOMERCAJ PETOJ KAJ PROPONOJ

Brazilo

Mario Fonseca, Caixa Postal 10822, 70324-980 Brasilia SCS-DF, anoncas aktualan retadreson paradizo@novamondo.net kaj TTT-ejon: www.novamondo.net (ankoraŭ nur portugale).

Ĉinio

Yantai-a Verd-stela Arta Kompanio Limigita, registrita ĉe la Internacia Industria kaj Komerca Administra Buroo, estis fondita en la jaro 1996. Nia kompanio ĉefe produktas kudra-pintajn kovrilojn de sofo kaj seĝo. La kompanio estas unu el la plej grandaj fabrikoj kiuj eksportas la sofarojn; estas ankaŭ fabriko kiu produktas la plej multe da sofaroj kun eta pinto en Ĉinio. Ni iutempe antaŭ komercas je aliaj kudra-pintaj produktaĵoj kaj brodaĵoj, ekzemple: tablobrodaĵoj, tapiŝoj, ktp. Ĉiuj niaj produktaĵoj estas eksportataj al fremdlandoj, ekzemple: Egipto, Saŭdarabio, Unuiĝintaj Arabaj Emirejoj, ktp.

Nia kompanio situas en kvartalo de la urbo Yantai, kiu apudas al la Boahi-maro kaj posedas avantaĝan geografian pozicion. La haveno de Yantai havas limojn al multaj landoj kaj regionoj. La flughaveno unuigas nin al grandaj urboj en nia lando. Ni varme invitas geamikojn en- kaj eksterlandajn landojn viziti nian kompanion por negoco, kunlaboro kaj amikaj rilatoj.

Direktoro: Wang Cheng-zhi; Yantai-a Verd-stela Arta Kompanio Limigita, No. 89-5-1 Huanshan-strato, Yantai, Ĉinio; rete: greenstar@163169.net , telefone: 0086-535-6605088 kaj 0086-535-6170665; fakse: 0086-535-6605088

Togolando

Nun komerci kun Afriko estas eble! Ni estas togolandaj esperantistaj komercistoj legale bazitaj en la haveno Lom, la ĉefurbo de Togolando. Ni vendas artikolojn senditajn de Eŭropo (veturiloj, kamionoj, radioriceviloj, komputiloj, televidoj, man-telefonoj, ktp.) Kontaktu nin, ni diskutu pri la kondiĉoj. Alves Klement, rete expedition17@yahoo.com , Lom, TOGO.

INTERNACIA SEMAJNO ĈE MEDITERANEO

de la 21a ĝis la 28a de aŭgusto 2004

SÈTE (Francio)

ESPERANTO, KULTURO KAJ PROGRESO proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto.

Profitu, samtempe trapasi agrablajn feriojn en la havenurbo SÈTE, en ripoza parko de pluraj hektaroj ĉe Mediteranea bordo, dum ideala periodo pro la bona vetero sed ekstere de la somera troa homamaso.

Ĉe ni, vi ĝuos plurnivelajn kursojn kaj ankaŭ banadon, ekskursojn kaj... bonan manĝadon.

<u>Programo</u>
Matene: diversnivelaj kursoj.
Posttagmeze: ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo.
Vespere: distraj kaj kulturaj programoj.
Ekskursoj: multaj eblecoj surloke.

<u>Aliĝkotizo</u>
70 eŭroj. Senpaga por malpli ol 26 jaraĝaj.

<u>Loĝado</u>
En "Lazaret" jen la prezoj por unu semajno; ĉambro kaj 3 manĝoj tage. La feriejo taŭgas por rulseĝuloj.

1 persono en unupersona ĉambro:	383 eŭroj
1 persono en dupersona ĉambro:	280 "
1 persono en familia ĉambro:	260 "

prezoj por infanoj laŭ peto.

Mendo de loĝado: post antaŭpago de 100 eŭroj antaŭ la 15a de julio.

- Eblas tendumi en la ĉirkaŭaĵo.
- Multaj hoteloj en la urbo.

Aliĝoj, klarigoj, mendoj je: ESPERANTO, CULTURE et PROGRES
5, rue du docteur Roux FR-34090 MONTPELLIER
jf.passarella@free.fr

Ne forgesu aboni Vian kotizon por la kuranta jaro 2004 (kaj tiun de la jaro 2003 se Vi tion ankoraŭ ne faris). La aliĝ-kotizo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kostas 15 eŭroj. Uzu unu el la jenaj banko-kontoj:

- BBVA: 0182 4106 71 0207160717
- Caja General de Ahorros de Granada: 2031 0225 54 0100187657

Bv. post pagi Vian jaran kotizon ne forgesi sciigi al la asocio Vian pagon. Uzu por tiu informo nian adreson en Malago, en Kordovo aŭ nian elektronikan adreson.

Komuniko de la Redakcio de GAZETO ANDALUZIA:

La nuna numero, aperunta dum la monato decembro 2003, ja aperas fine de la monato majo 2004. Pardonegu ĉi tiun prokrastigon, teknikaj problemoj kaj tro-abundaj familiaj kaj profesiaj taskoj malebligis la ĝustatempan aperon de la revuo.

La redakcio de la revuo deziras aperigi 4 numerojn de *Gazeto Andaluzia* korespondantaj al la jaro 2004. Nia agad-plano estas jena:

- Numero 73a (marto 2004) aperos dum la unua dekkvino de junio.
- Numero 74a (junio 2004) aperos fine de la monato junio.
- Numero 75a (septembro 2004) aperos fine de la monato septembro.
- Numero 76a (decembro 2004) aperos fine de la monato decembro.

Viajn kontribuaĵojn, opiniojn, sugestojn, kritikojn, kion ajn. bv. sendi al nia adreso:

GAZETO ANDALUZIA, Apartado de Correos 3142, 14080 Córdoba
esperanto14@supercable.es

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro
Prezidanto : Andrés Martín González
Vic-Prezidanto: José Francisco Martín del Pozo
Sekretario: Jesús García Martínez
Kasisto: Julio Herrero Segura
Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández
Delegito pri rilatoj kun Blinduloj: Alejandro Iglesias Campos.

Adreso: C/ Armengual de la Mota 33, 4D E-29007 MÁLAGA
E-Adresoj: esperanto@ciudadfutura.com
esperanto14@supercable.es
esperanto@vodafone.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

Ŝ Ŝereo

Hispana, tre ŝatata vino blanka, rikoltata en Andaluzio.

Plena Ilustrita Vortaro (paĝo 1.062)

Oni diras, ke la ŝerea vino estas la suno de Andaluzio ene de botelo. Tio, kio ja sonas kiel reklamema frazo, estas tute certa, ĉar dank´al la influo de la suno en la maturiĝo de la vinbero dum la rikolto oni povas atingi la koloron de la ŝereo kaj ĉefe tiun ne-egaleblan aromon.

Ŝereo (hispanlingve *Jerez*) estas la nomo de la urbo kaj la zono kie oni produktas la vinberon kaj naskiĝas la vino. Tiu vino kiu ĉefe dank´al britaj, francaj kaj irlandaj komercistoj vojaĝis tra la tuta mondo, diskonigante tiun belan parton de la sudo de Andaluzio: Ŝereo.

ESPERANT-LINGVAJ VORTOJ KIUJ, HISTORIE AŬ ETIMOLOGIE, DEVENAS DE ANDALUZIO.